

PSEUDOLECIDEA CLAUZ. ET ROUX, NOVA LIKINGENRO
(*Pseudolecidea* Clauz. et Roux, nouveau genre de lichen)

Georges CLAUZADE * – Claude ROUX **

RÉSUMÉ

Description d'un genre nouveau de lichen, *Pseudolecidea* Clauz. et Roux, d'après l'holotype de *Lecidea chalybeioides* Nyl. Il se distingue de *Lecidea* (Ach.) emend. Hertel par ses paraphyses libres ou presque et son tholus ascéal nettement I+ (bleu) dans sa partie externe et basale, I- dans sa partie supérieure et médiane.

Pseudolecidea chalybeioides (Nyl.) Clauz. et Roux, seule espèce jusqu'ici connue du genre est décrite :

- Thalle crustacé, aréolé, mince, apparaissant noirâtre à l'oeil nu, formé d'aréoles glauques ou d'un vert bleuâtre ou blanchâtre, ± dispersées sur un hypothalle noir bien visible.

- Apothécies (0,2-0,4 mm) noires lécideïnes, à demi enfoncées dans le thalle ou appliquées sur celui-ci, à disque plan et rebord mince mais persistant.

- Épithécium bleu-vert; hyménium 50-60 µm de haut; subhyménium incolore; hypothécium et excipulum en continuité, pourpre noir ou noirs.

- Paraphyses simples, libres ou presque, à sommet renflé et coloré en bleu-vert.

- Spores (4-9 × 3-4 µm) incolores, par 8, simples.

RESUMO

Priskribo de nova likengenro, *Pseudolecidea* Clauz. et Roux, laŭ la holotipo de *Lecidea chalybeioides*. Ĝi diferencas de *Lecidea* (Ach.) emend. Hertel pro parafizaro ne aŭ ne tre kohera kaj asko-toluso kun ekstera-baza parto distingebla J+ (blua) k supra-meza parto J-.

Priskribo de *Pseudolecidea chalybeioides* (Nyl.) Clauz. et Roux n.c. nura konata specio de la genro.

ENKONDUKO

Okaze de la determino de likenoj kolektitaj en Kantalo, Centra Montaro, Francio (v. ROUX, 1984), ni ekzamenis la holotipon de *Lecidea chalybeioides* Nyl., specio ĝis nun taksita kiel *Catillaria* (ZAHLEBRUCKNER, 1926) aŭ kiel *Lecidea* (KILIAS, 1981).

Post studado de la holotipo (afable sendita de O. VITIKAINEN, kiun ni tre dankas), ni alvenis al la konkludo, ke tiu specio apartenas nek al *Catillaria* pro sporoj senseptaj, nek al *Lecidea* pro parafizaro ne aŭ ne tre kohera k askololuso tre J+ (blua), special-tipa, sed al nova genro, kiun ni priskribas ĉi-sube.

DIAGNOZO : *PSEUDOLECIDEA* Clauz. et Roux gen. nov.

La ĉi-suba diagnozo baziĝas sur studo de la holotipo kaj de la izotipo konservataj en la botanika muzeo de Helsinko (H) en Finnio: Herbario de NYLANDER, nr-oj 20 208 kaj 20 210 («Tavastia orient. Luhanka, Mashkula-Legit. E.A. LANG, 1873»).

Thallus crustaceus, areolatus. Apothecia lecideina, nigra, marginatae. Hypothecium et excipulum continua, nigricantia. Paraphyses parum aut minime cohaerentes, simplices, cum tumida terminali cellula. Asci tholo clare I+ (caeruleo) instructi, praeter mediam et superiorem partem minime reagentem. Sporae octonae, sine colore, non halonatae, simplices.

* Rue des Pinsons, 84300 CAVAILLON.

** C.N.R.S., Laboratoire de botanique et écologie méditerranéenne, Faculté des sciences et techniques de Saint-Jérôme, rue Henri Poincaré, 13397 MARSEILLE cedex 13.





Fig. 1 - *Pseudolecidea chalybeioides*:

Transversa sekcaĵo de apotecio (duonskeme; punktitaĵo: subhimenio; nigraĵo: eksciplo k hipotecio interkontinuaĵ).

Coupe transversale d'une apothécie (semi-schématique; en pointillé subhyménium; en noir: excipulum et hypothécium en continuité).



Talo krusteca, areola. Apotecioj lecideecaj, nigraj, randaĵaj. Hipotecio k eksciplo interkontinuaĵ, nigretaj. Parafizoj ne aŭ ne tre intergluaĵ, simplaj, kun finĉelo ŝvela. Askotoluso distingeble J+ (blua) krom la meza k supra partoj senreakciaj. Sporoj 8-opaj, senkoloraj, senhaloaj, 0-septaj.

Typus generis / Genra tipo *Pseudolecidea chalybeoides* (Nyl.) Clauz. et Roux n.c. (Bas. *Lecidea chalybeoides* Nyl., *Flora*, 58: 12 1875)

PRISKRIBO (fig.1-2)

Talo: kelkajn cm², nudokule nigra, krusteca, areola, J-, K-, KC-, C-; areoloj (0,5-1 mm) maldikaj, glaŭketaj aŭ bluete aŭ blankete verdaj (pli-malpli manĝitaj de bestoj; normala koloro verŝajne nigra), pli-malpli disaj sur nigra hipotalo bone videbla.

Apotecioj: (0,2-0,4 mm) nigraj, lecideecaj, multetaj, duontalaj aŭ almetaj, kun disko ebena k randaĵo maldika sed daŭra.

Epitecio: blue verda, sengranula, el supro de parafizaro.

Himenio: (50-60 µm alta) senkolora.

Subhimenio: (ĝis 80 µm alta) senkolora.

Hipotecio kaj eksciplo: (la tuto ĉ. 100 µm alta kaj dika) interkontinuaĵ, nigre purpuraj ĝis nigraj, parte K+ (violete purpuraj).

Parafizaro: ne aŭ ne tre kohera, simpla aŭ preskaŭ.

Parafizoj: ĉebaze ĉ. 1,5 µm dikaj, ĉesupre (ĝis 4 µm dikaj) el kelkaj (ĝenerale 3) ĉeloj pli-malpli ŝvelaj, kun parieto blue verda.

Askoj: kun tolusos distingeble J+ (blua) krom la supra k meza partoj senreakciaj (fig. 2)

Sporoj: (4-9 × 3-4 µm) 8-opaj, senkoloraj, plimalpli elipsoidaj.

Disvastiĝo: S-Finnio k Francio (Centra Montaro).

Ekologio: sur nekalkaj rokoj humidaj aŭ sporade inundataj.

AFINECOJ

Pseudolecidea chalybeoides diferencas de *Lecidea* (Ach.) emend. Hertel pro parafizaro ne aŭ ne tre kohera kaj ĉefe askotoluso tre J+ (blua).

Ankaŭ *Lecidea* Körb. emend. Hertel et Leuckert, prezentas la ĉi-suprajn karakterojn sed havas malsimilan toluson, tute J+ (blua) (fig.3). La parafizoj de «*Lecidea ultima*» Th. Fr. tre similas al tiuj de *Pseudolecidea* sed la askotolusoj de la du genroj tre diferencas inter si (fig.4).

Fakte, laŭ HAFELNER kaj BELLEMÈRE (in litteris) la askosupro de *Pseudolecidea* tre similas al tiu de la *Candelariellaceae*; tial *Pseudolecidea* eble afinas al tiu ĉi sed ja ne al la *Lecideaceae*.

Konklude, *Pseudolecidea*, *sufiĉe* afina al *Lecidella* k *Lecidea ultima*, apartenas al la familio Lecideacoj.

BIBLIOGRAFIO

- KILIAS H., 1981. — Revision gesteinsbewohnender Sippen der Flechtengattung *Catillaria* Massal. in Europa (*Lecanorales, Lecideaceae*), *Herzogia*, **5** (3 + 4): 209-448.
- ROUX C., 1984. — Ctouzadeana Roux, nova likengenro. *Bull. Soc. Linn. Provence*, **35** (presata).
- ZAHLBRUCKNER A., 1921-1940. — *Catalogus Lichenum universalis*. 10 vol., Berlin, Borntraeger eld.